Universala Esperanto-Asocio

**AKRONIM-KULMIN**

HDE, UMEA, ILEI, RITE, UN, UNESKO

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2017-31 sendita el Budapeŝto, la 11an de novembro – la armistica tago por marki la finon de la Unua Monda Milito. Kune ni konstruadu pli pacan mondon!*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# *Heroldo* heroldas eksteran agadon

La 2a numero de *Heroldo de Esperanto* estas sendita al presejo, kune kun la **unua numero de la eldono en la portugala lingvo**. Tiu eldono havos propran enspezo-fonton, do temas pri du malsamaj projektoj. La portugala gazeto estas ĉefe por brazilaj neesperantistoj, sed taŭgas ankaŭ por esperantistoj, ĉefe se temas pri komencantoj. Ĝi uzeblos ankaŭ en aliaj portugallingvaj landoj.




Ĝi aperis nun kun nur kvar paĝoj sed la venonta numero devos aperi kun almenaŭ ok paĝoj kaj la celo estas aperigi monatan gazeton kun 16 paĝoj, kiel nun estas la eldono en Esperanto. La portugallingva temaro: Esperanto (historio, literaturo, kulturo), E-movado, lingvoj, poliglota movado, tria sektoro (pri neregistaraj organizaĵoj), ekonomio, politiko, mondo, arto kaj kulturo ĝenerale. La redakcio esperas estonte aperigi ĝin en aliaj lingvoj. La nacilingvaj versioj dividos konvenajn materialojn kun la Esperanta versio, sed tio estos transformita por ekstermovada publiko; krome aperos aparte verkitaj artikoloj. Apude ni montros la kovrilpaĝon de la portugala numero. La aŭtoro pretas respondi demandojn.

Laŭ teksto de Fabrício Valle

## Kuracista promeso legebla en Esperanto

La Monda Medicina Asocio (*World Medical Association*, WMA) kadre de sia pasinta internacia kunveno en oktobro reviziis kaj kompletigis la proponon pri „Promeso de la kuracisto“, kiu estis unuafoje publikigita kadre de la Deklaracio de Ĝenevo en la jaro 1948. Gravaj novaĵoj estas la instigo por gekuracistoj, ke ili atentu ankaŭ la propran sanstaton, kaj akcento al la aŭtonomio de la paciento. Esperanto- versio nun legeblas en la retejo de nia medicina faka asocio: http://umea.fontoj.net/deklaracio-de-gxenevo

Komuniko de d-ro Christoph Klawe

Prezidanto: Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)




# Dua eblo por fariĝi diplomita Eo-instruisto

La 16-an de oktobro ILEI anoncis la novan programon RITE + MADRIDO.

Aldone al ĝi ILEI anoncas nun plian eblon: RITE + 2 X POZNAN.

Tiu programo funkcios laŭ la sama skemo kiel la unua. Temas pri perreta lernado, lertigado, kadre de RITE ĉe www.edukado.net kun persona kontakto kun D-ino Katalin Kovats. Legu pri RITE ĉe: http://www.edukado.net/klerigejo/rite/informoj




**Daŭro:** de la unua de januaro 2018 ĝis la 31 de decembro 2018. Do tutjara lernado. Eblas anakŭ komenco ekde la 1a de decembro.2017.

**Ĉeesta parto:** unu semajno komence de februaro en Poznan, Pollando. Unu semajno fine de septembro en Poznan, Pollando.

Oni povas imagi, ke orienteŭropanoj ŝatos partopreni en tiu varianto.

Partoprenantoj povas esti ĝis 24 personoj, do urĝas aliĝo.

Ĉiuj detaloj aperas en la retpaĝo de ILEI: www.ilei.info.

Aliĝoj kaj demandoj iru al katalin.kovats@gmail.com kun kopio al mirejo.mireille@gmail.com

Laŭ komuniko de ILEI



Aldono SMG: Urboj kun rektaj flugoj al Poznano: Alicante, Ateno, Barcelono, Barcelono-Girono, Billund, Birmingham, Castellon, Doncaster/Sheffield, Dublino, Edinburgo, Eindhoven, Eilat, Frankfurto, Kijivo, Kopenhago, Corfu, Liverpool, Londono (Luton kaj Stanstead), Luqa (Malto), Lvivo, Madrido, Malmo, Munkeno, Oslo, Paris (Beauvais), Stokholmo, Tel Aviv, Varsovio. Multaj el tiuj temas pri moderprezaj kompanioj. Sur la mapo la ruĝaj umoj montras regulajn flugojn, la bluaj ĉarto-flugojn.

# Informilo de la UN-oficejo de Universala Esperanto-Asocio

Aperis la 31a numero de la bulteno Esperanto por UN. La bultenoj aperadas en tri versioj – en Esperanto, la angla kaj la franca. Temoj en la 31a bulteno estas raporto pri



la Tago de Unuiĝintaj Asocioj (24 oktobro), alparolo de reprezentanto de UEA al la tradukservo de UN (17 oktobro), la aljuĝo de la Premio Italio Homaj Rajtoj 2017 al Itala Esperanto-Federacio, festado de la laste starigita 'Internacia Tradukada Tago' (30 septembro), prelego Soros traktis Esperantan eldonadon (10 novembro), 39a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo kaj la Fina ceremonio de Zamenhof-jaro same en Unesko en Parizo, la 11an de decembro. Trovu la Esperantan bultenon en PDF-alkroĉaĵo.

**VORTOJ: 585**

=================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.